

Ernst Anschütz,  
O Tannenbaum

O Tannenbaum, o Tannenbaum,  
Wie treu sind deine Blätter!  
Du grünst nicht nur zur Sommerzeit,  
Nein auch im Winter, wenn es schneit.  
O Tannenbaum o Tannenbaum,  
Wie treu sind deine Blätter.

O Tannenbaum, o Tannenbaum!  
Du kannst mir sehr gefallen!  
Wie oft hat nicht zur Weihnachtszeit  
Ein Baum von dir mich hoch erfreut!  
O Tannenbaum, o Tannenbaum,  
Du kannst mir sehr gefallen!

O Tannenbaum, o Tannenbaum!  
Dein Kleid will mich was lehren:  
Die Hoffnung und Beständigkeit  
Gibt Trost und Kraft zu jeder Zeit.  
O Tannenbaum, o Tannenbaum!  
Das will dein Kleid mich lehren.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas ERNST ANSCHÜTZ (\*1780-10-28 – †1861-12-18).*

*Arg-593-1192 (2012-12-13 18:19:42)*

*Pri la verkinto Ernst Anschütz vidu ankaŭ la vikipediejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Ernst\\_Ansch%C3%BCtz](http://de.wikipedia.org/wiki/Ernst_Ansch%C3%BCtz). Tie estas indikitaj ankaŭ la muziknotoj. La melodio estas audebla en <http://www.youtube.com/watch?v=TlaRq509zKY>. La verkinto de la melodio ne estas konata. La muziknotoj troviĝas ekzemple en [http://www.lieder-archiv.de/o\\_tannenbaum-notenblatt\\_200078.html](http://www.lieder-archiv.de/o_tannenbaum-notenblatt_200078.html).*

Ernst Anschütz,  
Abio ho  
*tradukita de Richard Schulz*

Abio, ho! Abio, ho!  
Vi estas tre fidela.  
Vi estas verda en somer',  
En vintro kaj en primaver'.  
Abio, ho! Abio, ho!  
Vi arbo tre fidela.

Abio, ho! Abio, ho!  
Vi multe al mi plachas!  
Vi estas ja Kristnaska ghoj',  
Vi arbo apud negha voj'!  
Abio, ho! Abio, ho!  
Vi multe al mi plachas!

Abio, ho! Abio, ho!  
Min vi verdul' instruas:  
Ke konstantec', ke la esper'  
Konsolas nin en la mizer'.  
Abio, ho! Abio, ho!  
Min vi verdul' instruas.

*Traduko de la Germana poemo "O Tannenbaum" de ERNST ANSCHÜTZ (\*1780-10-28 – †1861-12-18) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, \*1906-07-12 – †1997-09-26).*

*Arg-593-1193 (2013-02-26 15:10:12)*

*Tiu chi traduko aperis en 1982/12 en la n-ro 42 de la Vestfaliaj Flugfolioj eldonitaj de Rikardo Shulco (Richard Schulz). Tie estas indikitaj ankau la muzik-notoj. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz).*